



Normanda Esperanto Bulteno

Organo de l'Union des Esperantistes de Normandie

- N° 48 -

- Marto 1959 -

Redaktas G. MAMMAUX, 27 Rue Jules Ancel, LE HAVRE (S. Mme)

** Nio Viro **

FECAMP. - Lastan semajnon de Decembro, la grupo elektis sian estraron por la jaro 1959-a

Honoraj prezidantoj: S-roj R. POTTIER kaj DELAMARE-MORE

Prezidanto : S-ro PERMANNE

Sekretariino : F-ino M. TURMEL - Helpa Sekret. : F-ino A.M. FORZY

Kasistino : F-ino S. JILLET - Helpa Kasist. : S-ino F. PERMANNE

Arhivistino : S-ino F. PERMANNE

Delegitino pri publikeco: F-ino J. COMTE

Direktoro de la kursoj: S-ro P. FOTTIER.

Kiel ĉiujare, la grupo festis la "Tri Reĝojn" la 17-an de Januaro. S-ro VILETTE, el Evreux, kiel ĉiufoje, partoprenis al la festo, kiu okazis en gajeco kaj ĉiam kun perfekta amikeco. Ludoj kaj dancoj finis la feston.

Tri novaj lernantoj, freŝliberigitaj de la milita servo, partoprenas al la kursoj, kaj alportas iom da espero por la estonto de la grupo ĉar ni ne forgesu ke S-ro PERMANNE estas sola, kiel vira aktiva membro en Fécamp, kaj, pro lia profesio, li estas preskaŭ neniam en la urbo, nur dimanĉe.

ROUEN. - La grupo organizas ĉiumonatan kunvenon kiu senĉese ampleksiĝas. Dum tiu kunveno oni parolas Esperante nur, kaj aŭdas priparoladon de iu el la grupanoj. Prezidanto JOUIS magnetofone kaptas la diskuton. Dank'al paciencaj klopodoj de niaj Samideanoj QUILLAU kaj LOISEL, "PARIS-NORMANDIE" (ĝenerala eldono) publikigis sur la unua paĝo enketon pri Esperanto.

ELBEUF. - Laŭ insisto de S-roj JOUIS, SAGET kaj BOSC, ĵus alvenita dinamika Samideano (S-ro CHAMARRET 61 rue Poussin) promesis organizi propagandon en aŭtomobilfabrikejo "Renault", apud Elbeuf k restarigi la tiean grupon.

DOMFRONT. - Samideano VERON, Delegito de U.E.A. senlace kaj nehelpate propagandas por Esperanto. Li organizos, dum la sunaj tagoj, publikan ekspozicion, prelegon kaj allogajn ekskursojn en sia bela regiono. Li de nun invitas la Normandajn Gesamideanojn partopreni tiun propagandon en Domfront.

LE HAVRE. - Kvankam la ĝelernantoj ne estas multnombraj, la kursoj normale funkcias, kaj pluraj esperas ja akiri ateston ĉe la fino de la kursoj.

★ ★ ★ ★ ★

NE RESTU ETERNAJ KOMENCANTOJ

Kutime oni diras ke Esperanto estas facila lingvo. Tio estas vera nur rilate al la ceteraj lingvoj naciaj. Efektive, Esperanto estas lingvo genie simpligita. Ĝia gramatika kaj sintaksa strukturo donas senlimajn eblojn por krei enhavoriĉajn esprimformojn.

Tamen, en la momento kiam oni decidas lerni ĝin perfekte, buŝe kaj skribe, oni renkontas malfacilaĵojn kaj rapide konvinkiĝas ke Esperanto estas lingvo tiel subtila, esprimoplena, kaj nuancoriĉa, kiel la ceteraj lingvoj, kaj sekve ĝi postulas daŭran, persistan kaj sisteman studadon ...

Por nia lingva kreskado kaj perfektigo, ni bezonas bonajn verkojn bonajn vortarojn, ĉiutagan ekzercadon en Esperanto - buŝan kaj skriban. Por kutimigi nian lingvon al belsona, eleganta parolado, ni devas ĉiutage voĉlegi 2 aŭ 3 paĝojn el bona verko. Tiam, ni ne balbutos en klubo aŭ antaŭ alilandaj Esperantistoj, sed flue konversacios.

Ni devas strebi senĉese al plibonigo de nia stilo, lernante ĉiutage ion de niaj grandaj majstroj klasikuloj: Zamenhof, Kabe, kaj de niaj modernaj verkistoj kaj stilistoj: Kalocsaj, Baghy, Waringhien, kaj aliaj.

Ni devas strebi al simpleco kaj klareco, ne forgesante ke perfekta harmonio signifas perfektan simplecon. Nebuleco en la vortoj pruvas malklarecon de la penso, netaŭgecon de la lingva instrumento. Neniam timi eltranĉi la superfluaĵojn, ili nur diluas la enhavon. Evitu tro amasigon de vortoj, evitu ankaŭ superfluan plibeligon aŭ ornamadon.

Veran belecon oni kreas per simplaj kaj malmultaj rimedoj. Tro ŝargita stilo kunportas balastron, kiu lacigas kaj stumbligas la legantojn.

La ĉiam pli vasta kaj grandskala uzado de Esperanto starigas antaŭ ni urĝan kaj gravan taskon: perfektigi en Esperanto. Laborante ĉiutage, sisteme kaj serioze, perfektigante senĉese, ni havos en niaj manoj taŭgan, akran instrumenton, per kiu ni rezuldone kaj utile laboros por konigi nian landon kaj popolon al la tutmonda Esperantistaro, por akiri novajn amikojn alinaciajn.

ASEN SIMENOV - el "Nuntempa Bulgario".

NE FORGESU PAGI VIAN KOTIZON!

U. E. N. + Normanda Bulteno: 200fr - C.C.P. ROUEN 283-40

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE

63 Boulevard François 1^{er} - LE HAVRE

KONGRESO

COMITE d'HONNEUR (propositions)

Monsieur le Maire de la Ville d'Evreux
M. le Président de la Chambre de Commerce
M. le Président du Syndicat d'Initiatives
M. le Directeur de l'Ecole Normale d'Instituteurs
M. Marcel BOSC, Président d'Honneur de U. E. N.

COMITE D'ORGANISATION

Président : Mme BELLETTRE
Vice-Président: Melle MONTAGNE
Secrétaire général: M. TRAGIN
Secrétaire-adjoint: M. VILLETTE
Trésorier: M. MONTAGNE
Trésorier-adjoint: Melle CHERVIN.

Carte de Congrès: 250 fr (gratuite jusqu'à
14 ans)
à M. Paul MONTAGNE, 5 Bd Buffardière - EVREUX
(Eure)

G.C.P. ROUEN 739-75

PROGRAMME

Samedi 2 Mai, à 20 h.

Bourse du Travail, rue de l'Ardèche:
Soirée artistique, suivie de bal
(buffet froid)

Election de Fraùlino Esperanto

Dimanche 3 Mai, à 9 h. 30.

Bourse du Travail


Ouverture du Congrès
(l'ordre du jour sera publié dans le prochain
bulletin)

Réception à la Mairie

Déjeuner en commun.

Après le repas, bal et visite de la Ville.

ADHESIONS & DEMANDES DE RENSEIGNEMENTS:
ESPERANTO-KONGRESO, 5 Bd Buffardière - EVREUX.



TURISMO KAJ ESPERANTO

Petu turisman prospekton de:

- Edegenforgalmi Hivatal. SZEGED (Hungarujo)
- S-ro Jakob SCHENKEL, am ZIEGELHOF 30 - Neu-Aschbach - SAAR
post KLARENTHAL
- Azienda Autonoma di Soggiorno e turismo
Via XIII Giugno 2 - RAVENNA (Italujo)..
- Centre de Diabétologie - VALS LES BAINS (Ardèche) Francujo.

A N O N C E T O

Letervespero okazos en LEIPZIG (Orienta Germanujo) la 20-an de Aprilo. Sendu amase belafrankitajn varbefikajn poŝtkartojn, prospektojn, ktp al

LETERVESPERO

P.adre.Karin BENAD

Schreberstrasse 12

LEIPZIG C I (Germanujo)

Ĉiu skribinto ricevos respondon, sed, ĉiu ankaŭ aldonu, ĉu li daŭre emas korespondi kun anoj de tiu grupo, aŭ ĉu li/si nur simple salutas ilin okaze de tiu letervespero.

EVREUX

dondeas ĉi!

EVREUX.-- Kunsido de la kongreskomitato prezidita de S-ro BOSC okazis la 7-an de Februaro kaj decidis pri la fina programo (Vidu specialan artikolon).

La Grupo de Evreux rimarkigas al ĉiuj normandoj ke, okaze de la aliaj kongresoj, tiu grupo alvenas amase per aŭtobuso. La Kongreskomitato-anoj admonas ke oni reciproke agu por ili.

N E N I A L P R O M E S U V I A J N 2 _an k 3 -an

D E M A J O

E S T A S L A K O N G R E S O E N E V R E U X !

★ ★ ★ ★ ★

LA ANGULO DE LA PROPAGANDISTO

X X X X X

Connaissez-vous l'affiche en couleurs de l' U.E.F.? Très attrayante, elle est d'un prix modique et elle renferme une partie blanche sur laquelle vous pouvez faire imprimer la date et le lieu de reprise des cours. Commandez-la dès maintenant, sans attendre la bousculade de Septembre qui risque d'en retarder la livraison. Vous ne le regretterez pas. Pas besoin de colleurs d'affiches: de nombreux commerçants se feront un plaisir de l'exposer dans leur vitrine.

INFANAĴOJ

=====

ROŠUROJ VERKITAJ KAJ ILUSTRITAJ DE LA INFANOJ

Eldonejo de la moderna franca lernejo CANNES

Lernejo de Sainte-Marguerite (Hautes-Alpes)

HISTORIO DE LA KNABETO SUR LA MONTO

Justin estas feliĉa.

Morgaŭ, li foriros al l'Oriol.

Tie, li restados la tutan someron.

Supre, staras lia lignodomo kun tiu de Johanino, de Felicia Augustino.

Supre, oni amuziĝas la tutan tagon.

Oni paŝtas la bovinojn, sed tio ne estas laciga.

Oni lasas ilin vagi sur la monto kienili volas.

Poste, vespere, oni iras por serĉi ilin.

LA FORIRO

Hodiaŭ, oni supreniras.

Jam, la mulino estas for. Sur ĝia dorso, oni metis pajlon por konstrui liton, buterigilon, kaldronojn, senŝaŭmigilon, sitelojn. Justin kaj Eliza kunportas la manĝprovizojn por ok tagoj.

Jen ili marŝas sur la vojeto. Ili estas feliĉaj.

Justin antaŭe marŝas. Dikan bastonon li uzas kiel stikon.

LA ALVENO AL L'ORIO

Ili supreniris malrapide, la vojo estas longa. Kelkfoje, ili ripozis por trinki el la fontoj aŭ por manĝi fragojn. Nun, ili alvenas al la lignodomoj.



Justin flaras la odoron de la violoj kaj de la sovaĝa timiano.

La aero estas malvarma. La domoj estas malbone konstruitaj. Ili havas nek fenestrojn, nek kamenojn. La tegmentoj konsistas el tabuloj; la muroj ne havas morteron.

Justin vidas belajn florojn, dikajn arbojn.

Li estas feliĉa.

(Tradukis el la franca: S-ino VINCENT,
avenue de Gaulle - LES ANDELYS - Eure)



«Nous passons 2 frontières -
Madame, voulez vous un
vocabulaire d'ESPÉRANTO?»